

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTO ★

La ĉefa redaktanto de ET (ne la ĉefredaktoro) estas la legantoj mem. Sendu al ni interesajn manuskriptojn, kaj la enhavo de ET estos laŭ via deziro!

Eldonantaro:  
D-ro L. Zamenhof, Warzawa (Varsovio)  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gili Norta, Barcelona  
H. Fischer, grandindustriisto, București (Rum.)  
Teo Jung, Köln (Kolonio)  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

Administrejo:  
Horrem bei Köln, Germ.  
Postĉekkonto Köln 70868, por Teo Jung, Horrem.

Redakcio:  
Ĉefredaktoro: Teo Jung.  
Literatura red.: Zanoni.

### Aperas semajne, kun monataj aldonoj „Revuo“ kaj „Internacia Komerco“

Abonon ni akceptas ne por fik-ita tempo (jaro, monato) sed por nombo de ET-numeroj. Oni sendu iun sumon, kaj ni liveros ET ĝis elĉerigo de la sumo. Pri finiĝinta abono ni informas. Oni pagu ne per poŝtmandato, sed per ŝtataj monbiletoj en rekomendita letero. „Revuo“ kaj „Internacia Komerco“ senpage por ET-abonantoj.

Prezo de unu numero por la landoj kun kolonioj:

Argent. 0.15 Peso	Cehosl. 1.20 Kr.	Germana 600 Mk.	Kanada 0.06 Dol.	Portug. 0.60 Esk.
Aŭstra 1.00 Kr.	Estonia —	(Abono nur ĉe poŝtĉekoj)	Latvia —	Rumana 4 Leol
Belgia 0.65 Fk.	Finna 1.20 Fmk.		Litova 30 Cd.	Rusa 200 Gmk.
Brazila 0.400 Mr.	Franca 0.60 Fk.	Itala 0.80 Lit.	Nederl. 0.15 Hfl.	Sveda 0.24 Kr.
Brita 3/4 Pc.	Hispana 0.30 Pes.	Japana 0.10 Jen.	Norvega 0.20 Kr.	Svisa 0.30 Fk.
Bulgara 4 Levol	Hungara 60 Kr.	Jugosl. 2.00 Din.	Pola 800 Mk.	U. S. A. 0.06 Dol.

Nenomnitaj landoj pagu provizore egalvaloron de 0.20 sv. fk. aŭ 0.04 Dol.

Por Adressaĝoj ni kalkulas du numerojn de la abonkonto.

Dumviva Abono kostas la prezon de 400 numeroj. Anoncoj kostas po cm<sup>2</sup> 0.10 svisan frankon (aŭ ĉe an'aŭpago 200 gmk.); rabato laŭ interkonsento. Por „Internacia Komerco“ kaj specialaj numeroj — — — — — speciala prezo.

N-o 130 :-: Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :-: 1. IV. 23.

## Timovo

la urbo de la Dekaj Bulgara Esperanto-Kongreso.

La Dekaj Kongreso de la Bulgara Esperantistoj okazos en urbo Timovo. Kredante, ke multe da samideanoj-fremduloj ankoraŭ ne konas la antikvan bulgaran ĉefurbon, kaj esperante, ke ili bonvolos viziti nian kongreson, mi konatigos la legantojn kun nia urbo V. Timovo.

### Veliko Timovo.


La urbo Veliko (Granda) Timovo kuŝas inter (sed ne apud) rivero Danubo kaj „Stara Planina“ („Malnova Monto“) en pentrinda valo, ĉirkaŭita de plej diversformaj pintoj, klinaĵoj kaj montoj. La rivero Jantra je daŭro de du horoj da vojo traboras tiun valon formante de l' sudo, ĉe la eniro, kaj de l' nordo, ĉe sia eliro el ĝi, du belajn monto-tralirejojn kronitajn flanke per ŝtonegoj.

La suda tralirejo estas nomata „Ustieto“. Malsupre en tiu ĉi valo-montotralirejo trafluas la rivero Jantra kaj, mallarĝigita en sia ŝtonega riverujo, gaje murmurante rapidas por eliri el sia mallarĝejo. Zonumante la urbon kiel serpento, la rivero Jantra gaje kantas sian eternan kanton kaj, saltante de ŝtono al ŝtono, per sia sorĉa kanto dormigas la loĝantaron de Timovo. La vojaĝanto, venante el Balkan-montaro (Stara Planina), kvazaŭ tra fenestro ekvidas Timovon de tiu montotralirejo, kaj post kelke da paŝoj la urbo majeste aperas antaŭ li.

La norda tralirejo estas nomata „Dervenito“. Ĝi estas riĉa je diverskoloraj floroj, herboj kaj arboj, kaj pro tio multaj timovanoj travivas tie la someron, kiam en la urbo estas varmege.

Kvin kilometrojn de Timovo, alproksimigitaj ĝis la ŝtonegoj de „Dervenito“, sin kuŝas la du belaj kaj riĉaj monaĥejoj „St. Preobraŝine“ kaj „St. Trojca“, sur kies tegmentoj kaj krucoj la sunradioj ludeme sin rejetas kaj malproksimen brilas, invitante la vojaĝantojn por viziti tiujn du sanktejojn, kiuj restis el la tempo de antikvaj bulgaraj reĝoj.

Je la dekstra flanko de „Dervenito“ sin etendas la fervojo Rusĉuk-Timovo, kiu pasas tra du tuneloj sub la urbo Timovo mem, sur du belaj pontoj super la riveron Jantra, kiuj aldonas ankoraŭ pli ĉarmantan vidaĵon al la vojaĝanto alvenanta per la vagonaro.



Supre: Timovo, rigardata de la stacio.

Apude: La semajna folro en Timovo.



Ĉirkaŭante la urbon, la rivero Jantra lavas kelkajn pintojn de diversaj flankoj kaj donas al ili formon de duoninsuloj, de kiuj tri tiras sur sin la atenton de l' naturamanto. Sur la meza duoninsulo, kiu estas la plej granda, estas kon-

struita la urbo Timovo. Plej admirinda estas la situo de la urbo. La domoj estas dislokigitaj amfiteatre kaj kvazaŭ amasigitaj unu sur alia. Plej ĉarma estas la vidaĵo de la urbo vespere, kiam en ĉiu domo brilas lumo. Tiam Timovo

similas al unu grandega lustro, sur kiu brilas kandeletoj.

La orienta parto de tiu duoninsulo estas la miriga loko „Hisara“ (Reĝelo). Ĝi estas ĉirkaŭita per dikaj muroj, grandegaj de ĉiuj flankoj ŝtonegoj, kaj havas formon de kuŝanta martelo, kies tenilon konsistigas pontiforme ordigitaj ŝtonegoj, kaj la martelo mem etendiĝas de nordo al sudo, altiĝas en la mezo kaj formas konusan pinton nomatan „Can-tepe“ (Sonorila Martelo). Meze de „Hisara“ sur la plej alta loko estis iam la patriarka (ĉefepiskopa) preĝejo „St. Spas“, kiu havis altan sonorilturon, de sur kiu oni povis observi la tutan ĉirkaŭaĵon de la urbo. Oni povis vidi ĝin de malproksime, kaj per sia brilego en la suno ĝi faris fortan impreson kaj elvokadis tremeton en la koroj de la bulgaroj. Norde de ĝi estas trovata la reĝa preĝejo „St. Petka“, kaj inter tiuj du preĝejoj etendiĝis la reĝaj palacoj, ornamitaj per diverskoloraj figurvitraĵoj, kies restaĵoj estas ĉirkaŭe trovataj eĉ hodiaŭ. Tie ekzistas ankoraŭ restaĵoj de la diversaj domoj de la eminentaj reĝaj familioj kaj ankaŭ tiaj de la membroj de la reĝa gento.

La dua duoninsulo, kiu kuŝas sude de l' unua, estas t. n. „Sankta arbaro“, ĉar sur ĝia norda parto estas densa arbaro kaj dum la antikva tempo ĝi havis multe da monaĥejoj, monaĥejoj kaj preĝejoj. Printempe la vidaĵo de la urbo estas rava por rigardanto siŝaranta sur tiu ĉi duoninsulo. La kantado de najtingaloj en la arbaro, en la arbaretoj kaj arbetoj, en najbaraj valetoj kaj sur pintoj elvokas la gajecon de l' homoj kaj la deziron por promenadi. Flokantoj de junuloj kaj ludado de gitaroj kaj mandolinoj kunigas en printempo kun la pepado de la birdoj kaj vekas vivon en la timovanoj, al kiuj „Sankta Arbaro“ servas kiel plej proksima kaj agrabila promenejo. Ĝi prezentas nun riĉegan parkon de la urbo, kun kiu ĝi estas ligita per bela fera ponto super rivero Jantra.

La tria duoninsulo estas nomata „Trapezica“. Tie oni ankaŭ trovas restaĵojn de preĝejoj el la tempo de niaj unuaj reĝoj. „Trapezica“ estas ĉirkaŭita de ŝtonegoj, kiuj formas diversajn figurojn kaj nevole rememorigas al la rigardanto la tempon de niaj majestaj reĝoj. La reĝo kaj la nobelaj bulgaraj familioj, kiuj loĝis sur „Hisara“ kaj „Trapezica“, komunikis per grandega movebla ponto liginta la du duoninsulojn.

Plej gravaj historiaj restaĵoj el la tempo de antikvaj bulgaraj reĝoj estas „St. 40 muĉenici“ (40 S-taj Martiroj), kie reĝiĝis Asen II-a, kaj „St. Dimitr“.

## PASKO.

ALAŬDO JAM EN PASKA FRUO EKFLUGIS SUPREN TRA LAZUR' KAJ JUBILKANTIS EN LA BLUO LA RENOVIGON DE L' NATUR'. KAJ ĜIAN KANTON JA NE LASIS MIL VOĈOJ SUBE SEN RESPOND'. ĜOJU! LA VINTRO JAM FORPASIS. ĜOJU, VI JUNIĜINTA MOND'!

Traduko de Zanoni.

### En arbaro nokte.

(Pino.)

Ili venis el multaj landoj. Estante superhome kapablaj kaj mirakle fortaj, flugantaj, alimondaj estaĵoj, — ili ĉiuj devenis tamen el nia homa medio kaj heredis nian multlingvecon. Videble neniu el ili eĉ povis supozi la eblecon de internacia lingvo. Kaj sentante timon mi sentis ankaŭ fieron. Ni, la parto, malgranda areto el la homaro tutmonda, havas nian Esperanton. Ni jam paŝis al nova internacie organizota epoko. Sed ili, ne havantaj la regnajn limojn inter si, esence internaciaj estaĵoj — ili restis senhelpaj, ili ne komprenis unu la alian, kaj nur la komuna diabla ideo, komuna malica intenco kontraŭ la malamata homaro kunigis ilin. Kaj ili kriis pri siaj sukcesoj, pri la alportitaj novaj konfliktoj al la homaro — kaj nur kelkaj povis kompreni unu la alian. La aliaj estis kvazaŭ surdaĵ. Fine venis en la mezon de la cirklo unu furioza sorĉistino, parolanta la saman lingvon kiel mi. Ŝi kriis al ĉiuj pri la venĝo al homo, kiu kuraĝis aperi en la difinita ensorĉita loko. Poste ŝi ripetis tion en terure kripligita germana lingvo.

La supozeble germanaj ŝiaj kunulinoj subkaptis la ekkriojn kaj plue kripligante ĝian signifon, tradukis ĝin per ekkrioj en la franca kaj anglan lingvojn. La respektivaj sorĉistinoj de tiuj lingvoj kriis ĝian „tradukon“ en aliaj konataj al ili lingvoj, kaj la signifo de la frazoj, kiujn kriis la unua, samlingva al mi sorĉistino, en kelkaj minutoj ŝanĝiĝis ĝis nerekonsebleco! Mi ekmemoris la internaciajn mondajn konferencojn de homoj. Min kaptis rido, forta rido, kies spasmojn ni ne povis deteni. Mi forgesis pri la danĝeroj kaj timoj kaj ekridis per la tuta forto de miaj pulmoj. Ha—ha—ha!!! — reĉis al mi la arbaro, kaj kelkfoje ĝi ripetigis, tiu mia forta rido. La sorĉistinoj ekstartis mirigitaj, kaj tiu el ili, kiu parolis mian gepatran lingvon, en surprizo demandis min:

„Kial vi ridas, bubo? Ĉu vi ne scias, kio vin atendas? Aŭ ĉu vi frenezigiĝis de teruro?“

„Estas por mi tute indiferente,“ mi respondis. — „Sed neniam mi imagis la sorĉistinojn tiom malsaĝaj kaj ridindaj.“

„Kial?“

„Ni, kelkaj miloj da homoj jam delonge uzas facilan internacian lingvon kaj vi...“ Subite min kaptis forta, riproĉa bedaŭro. Kial mi, malprudenta, donu tian informon pri la potenco armilo al tiuj, kies ĉefa tasko estas pereigi nian pacon, amon kaj semi malpacon. Ne. Tion mi eĉ ne devus esti aludinta.

Sed la samlingva malcullno jam kaptis mian frazon. Ŝi tuj komprenis la tutan gravecon de ĝia signifo, kaj mi ekaŭdis la bruon de novaj aklamoj, kiam ŝi komunikis la eltrovon al siaj kunulinoj. Ĝi estis infera muziko. Nur unu sola frazo pri internacia lingvo videble sonis en ĉiuj

lingvoj de tiu malbenita kongreso. La samlingvulino kaptis mian gorĝon per ostaj fingroj kaj, spirante al mi en la vizaĝon, kun brilaj okuloj, komencis ekzameni, demandi min, pri kiu lingvo mi parolis.

Mi nenion respondis. Mi komprenis, ke por mia jam farita eraro mi devus pagi per la vivo kaj turmentoj, sed neniam doni tiom potencan ilon al la sangaj malamikoj de la homaro.

Ili ĉiuj sin jetis al mi, ĉiuj min volis skui, demandis, malicaj sed sciavida, inferaj sed ardantaj per pasia deziro ricevi tiun rimedon, per kiu ili fariĝus centoble, miloble pli potencaj.

Mi ne respondis, mi sentis nur, ke la premo de la ostaj fingroj farigas pli kaj pli sufokiga, ke oni min altrenis jam al la laĝeto kaj volas dronigi. Mi ekstartis subite la malvarmon de akvo kaj akrajn spasmojn en miaj pulmoj kaj... vekiĝis. Antaŭ miaj okuloj mi ekvidis la nigran nazon de Nox. Per unu piedo la hundo sin apogis sur mian kolon kaj, serĉante la apogon por la dua, ĝi foriris de mi la jaketon. Ĝi deziris veki min kaj ekboletis, vidinte, ke miaj okuloj malfermiĝis.

Mi depuŝis la ĉirkaŭprenon de l' fidela hundo kaj ekrigardis la fenestron.

Super la tuta arbara herbejo pendis densa vualo de nebulo. Ĝi aspektis kiel lakto, la griza matena lumo apenaŭ povis ĝin trapenetri.

La nokto estis finiĝinta, forportante kun si mian strangan neniam forgeseblan sonĝon.

Mi eliris al la bordo de la laĝeto kaj lavis min per ĝia freŝa, malvarma akvo.

En la arbaro jam ekfajfis la frumatena birdoj.

Originale v. rktis N. Hahlov, Zagreb.

## Paskaj popolaj kutimoj en Ukrainio.

De E. Baĉinskij, sekretario de la Kom. Cambro Ukr.-Svisa en Genève.

En popolaj kutimoj, ankaŭ religiaj ritoj de Ukrainio, estas konservitaj ĝis nia tempo multaj idolanaĵ kutimoj. Ili sin intermiksis kun ritoj kristanaj kaj dum la festoj sin manifestas kune kun tiuj.

En paskaj kutimoj ni renkontas la feston de la renoviĝo de la naturo. Ili plejparte perdis sian simbolan karakteron, sed estas tamen interresinda.

La antaŭpaska semajno nomiĝas „Branĉa semajno“ (ukraine „Beĉkova Nedilja“); ulmanĉon la estro de familio iras preĝejon kun la branĉo de saliko, kiun li benigas de pastro. La benita branĉo estas ple konservata. Kun ĝi oni kondukas unue la bestaron al paŝtejo.

La preparado al la paskofesto estas tre diligenta: oni purigas domon, kolorigas ovojn, zorgas pri novaj printempaj vestaĵoj. Oni fastas dum sep semajnoj kaj la lastajn kvar tagojn la fastado estas ankoraŭ pli severa.

En antikva tempo oni kutime lumigis fajrojn de gajo sur montoj aŭ antaŭ preĝejoj. Oni ilin nomis „Petriv Ohon“ (Fajro de Petro). Ĉe la karpataj ukrainoj (Huculoj) oni brilligas tiajn fajrojn meze de la bestaro, por ke ili ŝajnu belaj, brilantaj, kiel Dia lumo, por ke neniu demono aperu inter ili. La ukrainoj de Podolio kaj Volinio ruligas desupre de la montoj flomantajn ĉarradojn, ankaŭ oni jetas en la aeron brulantajn bastonojn. Tiaj kutimoj estis oftaj en la mezepoko ĉie, precipe en Francujo kaj Svislando.

Proksime de Tirnovo estas historia vilaĝo Arbanasi, kiu ludis gravan rolon dum nia sklaveco.

Tirnovo havas 13000 loĝantojn. Ĝi estas distrikta kaj ankaŭ grava industria kaj politika centro, ĉar ĝi troviĝas en la mezo de la lando. Ĝi ne estas riĉa je grandegaj konstruaĵoj, ĉar ĝi estas antikva urbo. Plej grandaj konstruaĵoj estas la kazernoj, la komunumejo, la knaba kaj knabina gimnazioj, la leĝejo, la hospitalo k. a. Tertremo preskaŭ detruis la urbon en 1912. Tiu-tempe la tirnovanoj loĝis dum du monatoj en la kamparo, kaj kiam la tero trankviliĝis, la urbo estis rekonstruata.

Tirnovo estas multe vizitata de turistoj, ĝenerantoj kaj eĉ de alilanduloj, kiuj forlasas ĝin kun fortaj impresoj kaj belaj rememoroj pri la urbo. Dum la rusa-turka milito Tirnovo gastigis eminentajn rusajn sinjorojn, kaj unu el ĝiaj stratoj estas nomita laŭ rusa generalo Gurko. Dum la mondmilito en 1915 Tirnovo gastigis la ĉefon de la orienta germana armeo, marŝalon Mackensen, kaj nun je lia honoro la ĉefa strato en Tirnovo portas la nomon „Makenzen“.

Tirnovo ankaŭ estis centro de la bulgara kulturo, kaj prave la poeto kantas pri ĝi:

Centjaroj sub standard' de Bulgarijo  
Vi estis centro de la lum' brilanta:  
Nun vi vekigu ĉe libero de l' patrujo,  
Kunigu vian junularon al laboro utilanta!

Tirnovo estas grava por ni bulgara Esperantisto, ĉar ĝi estas la lulilo de Esperanto en Bulgarijo. Ĝi estas la unua bulgara urbo, kiu fondis Esp. grupon, kies anoj eldonis la unuan Esp. gazeton „Lumo“ en Bulgarijo.

Nia pasinta IX-a Kongreso en Sofio decidis, ke nia X-a okazo en Tirnovo je honoro de ĝia pasinteco.

Esperante, ke nia X-a Bulgara Esp. Kongreso, kiu okazos dum 12.—15. Julio 1923 en nia urbo, estos vizitata de multaj fremduloj, ni, tirnovaj Esperantistoj, sendas nian Esperantistan saluton al ĉiuj samideanoj.

Vivu Esperanto!

Georgi Donĉev,  
Sokr. de „Lumo“ en Tirnovo.

## Nun de L. K. flugu ĝi al L. K.!

Tiel pensis Prof. Cart, sendante al la Lingva Komitatoj la cirkuleron pri la elekto de novaj kandidatoj por la L. K. Almenaŭ asertas tion al ni Prof. Bruno M. en Roma.

Sed ni ne ŝercu, ĉar la temo estas serioza. Ni legis la nomojn de la kandidatoj proponitaj por la L. K. Kvankam inter ili troviĝas ankoraŭ kelkaj, pri kies lingvosperto ni rajtas iom dubi (sed eble, definitive elektitaj por la L. K., ankaŭ tiuj klopodos finligni la lingvon), la plimulto tamen ŝajnas esti tute taŭgaj por la ofico. Ni do ne kritiku nun tro severe, sed ĝoju, ke baldaŭ ni havos denove kompletan lingvan institucion, kiu — se ĝi volos — povos funkcii.

Cetere ni ne forgesu la malfacilan situacion de Akademio kaj L. K.: mankas mono (absolute), mankas libervolaj helpantoj, mankas tempo; nur unu ne mankas — laboro. Tion ni memoru, kritikante. Kaj ĉe nia tuta kritiko ankaŭ restu almenaŭ iom da rekono por la meritoj, kiujn akiris al si la Prezidanto de nia Akademio en la antaŭmilita tempo kaj nun, kiam li staras sola kaj preskaŭ senhela sur sia posteno. Lia laboro ja estas ampleksa: Oficiala Gazeto ne plu operas pro manko de mono; do li devas mem zorgi pri kopiado de la dokumentoj de Akademio kaj L. K., pri cirkuleroj, personaj leteroj ktp.

Al li, nia nelacigebla, maljuna kaj malnova ploniro, ni direktu nian plej koran dankon pro lia libervola laborado kaj niajn sincerajn dezirojn por la bona funkciado de la nova Lingva Komitato!

Ĵaŭdon antaŭ Pasko ĉiuj iras preĝejon kun brulantaj vaskandeloj, oni devas reveni hejmen kun la kandelo estingiginta. La kandelo estas konservata kiel rimedo kontraŭ „malbona okulo“, dentoŭoro ktp.

Oni preparas por Pasko apartan panon („kukuzi“) el sekalfaruno; tiujn panojn oni donacas unu al alia, gratulante. Gejunularo portas tiujn „kukuzi“ el unu domo en alian, forpelante tiel la ĉefdiablon („Herodon“). Ankaŭ oni donas al infanoj kuiritajn fabojn je memoro de mortintoj.

Depost Sankta Vendredo la kuirformo ne estingiĝas. Virinoj observas superstitiajn regulojn je fabrikado de „Pasha“, granda kuko longforma el tritikfaruno. En orienta Ukrainio oni ĝin nomas „papuŝnik“ aŭ „baba“. Oni faras ankaŭ kukon el blanka fromaĝo, sur kiu estas presita Malta kruco. Krom granda „pasha“ el tritikfaruno oni bakas diversajn kukoetojn („perepiĉki“). En alia granda kuko („zastionik“) oni enigis per la pinto tiom da ovoj, kiom da personoj estas en la familio. Kies ovo rompiĝos, tiu mortos venontan jaron. Ankaŭ oni kuiras specialajn manĝaĵojn por hejmbestoj.

Riĉuloj kuiras porkidon kun rafanradiko inter dentoj. La huculoj benigas fabojn, papavon, papilpulvon kaj aliajn aĵojn.

La kolorigitaj ovoj („pisanki“ kaj „kraŝanki“), laŭ popola kredo, antaŭgardas kontraŭ „malica spirito“, fajrego, ktp. La ovoj paskaj estas tre antikva kutimo en Ukrainio, pli antikva ol kristanece. Oni trovas bildojn de ovoj en antaŭhistoriaj „kurganoj“ (antikvaj tombaj komunaĵoj), ornamitajn same, kiel ovojn nuntempaj. Ĉe la idoloj la ovoj estis simbolo de la renoviĝo de la naturo. La kutimo ornamiti kaj pentri ovojn estas kutimo idolaneca kaj la kristana eklezio en unua tempo vane luktis kontraŭ tiu rest-

# VENEZIA.

## Saluto al la gastoj.

Unuafoje vi kunvenas oficiale kaj are — la civitanoj de Esperantujo — en nia sunorimita lando jarmilhistoria.

Ni etendas niajn manojn por premi la viajn kaj ni deziras bonan sukceson al via laboro. Dum ie kaj ie oni ankoraŭ klopodas por detruo, al vi — akcelantoj de l' plej elfundaj rimedoj por mondrekonstruo, de ĉie venintaj kaj morgaŭ denove ĉien disflugontaj — ni prezentas la bondeziron, ke la semo, kiun vi forportas, donu sepdek-sepoblan frukton el tiu mondgrundo, kie la radikoj de ekonomia kaj de idea vivo sin interligas fortike en la malhelaj internaĵoj de historio!

„Helpu ni al ni, nepre helpos Di!“  
Serioze. Animtrankvile. Fide.

Itala Esperantista Federacio.

## Internacia Konferenco por Komuna Komerca Lingvo

Venezia, 31. III. — 4. IV.

Ĝenerala tagtabelo.

Sabato, 31. marto.

Akcepto. Preparaĵ kunvenoj.

Dimanĉo, 1. aprilo (Pasko).

Matene: Diservoj katolika kaj protestanta.  
Pigm.: Vizito al la urbo (en tiu tago eble okazos la Solena Akcepto en Napoleona Salono de Reĝa Palaco kaj la ekskurso al Estuarlo, organizita de l' urbestaro).  
Vespere: Interkonatiga vespero en kafejo.

Lundo, 2. aprilo.

Matene: Malfarmo de laborkunsidoj en ejo de Komerca Cambio.

Pigm.: Ordinara kunsido en Hotelo Wagner.  
Vespere: Kunveno a) de angla lingvanoj, b) de Nacia Konsilantaro de FEI, c) de komisiono por reformo de FEI.

Mardo, 3. aprilo.

Matene kaj pm.: Du laborkunsidoj.  
Vespere: Teatra prezentado.

Merkredo, 4. aprilo.

Matene: Laborkunsido.

Pigm.: Solena festo.  
Vespere: Komuna oficiale vesperrango.

Ĵaŭdo, 5. aprilo.

Pigm.: S-o Aug. Pihl, del. de Praha Foiro, parolos en Teatro Italia pri Praha kaj Praha Foiro, kun filmoj.

## Unua provizora listo de organizaĵoj oficiale reprezentataj. (Laŭ la stato de 15. marto.)

40. Komercaj ĉambroj:  
Italia (18): Bologna, Cagliari, Catanzaro, Lecce, Cremona, Maniova, Padova, Potenza, Pisa, Siena, Treviso, Verona, Venezia.  
Franclanda (6): Paris, Lyon, Deux Sèvres, Thier, Lure, Tarare.  
Anglialando (2): London, Bedford.  
Aliaj (10): Hradec Kralove, Lausanne, Sion, Genève, Budapest, Braila, Ared, Brno, Sacramento U. S. U., Lugano.  
Internaciaj (9): Itala K. Ĉ. en Belgio, Itala-Germana Itala-Svisa en Genève, Itala en Casablanca, Cina K. Ĉ. de Siam, Franca en London, Belga en London, Nederlanda en Milano, Itala-Rumana.
- 41—50. Specimenfajroj de Ljubljana, Frankfurt, Praha, Bordeaux, Paris, Lyon, Reichenberg, Barcelona Milano, Padova.
- 51—55. Mondfirmoj: Welthandels-Gesellschaft en Wien; A. Vogt, bankisto en Stuttgart; Karl Lassen, transport-firmao en Berlin; Howlett & White en Norwich; Dr. Fischer, grandindustriisto en Bucureŝti.  
56. Bureau Suisse pour le Tourisme, Zürich.  
57. Société Coopérative des Consommateurs, Genève.  
58. Association Suisse des Hôteliars, Syndicat de Genève.  
59. Confédération Générale de l' Ameublement, Lyon.

ajo el idolaneca epoko. En okcidento la kristaneco venkis la ritojn idolanajn, sed en orienta Ukrainio ĝi nenion povis fari por forigi la kutimon beni la printempan feston Paskon per ovoj. Antikvaj ornametoj vidigas sur ovoj, kiujn ukrainoj donacas dum pasko al alia, dirante: „Hristos Voskres!“ (Kriso reviviĝis), kunigante tiamaniere la idolanajn simbolojn kun kristana festo. La ŝeloj de tiuj ovoj, benitaj en preĝejoj, estas konservataj pie kiel rimedo kontraŭ malbona sorto. Oni konservas ankaŭ tutan jaron la ovojn, kiel amuletojn de feliĉo, tial la pentrado konservas ornammodelon de unu jaro ĝis aliaj dum centjaroj. Sabate oni metas ovojn sur tombojn de parencoj. En la ornamentrajo de la paskaj ovoj videbliĝas la artemo de ukrainoj, ankaŭ la antikveco de tiu arto. Estas ornamoj geometriaj, kreskaĵaj, besifiguraj, historiaj. La ornamoj estas tre antikvaj, ilia deveno kalkulas ĉirkaŭ dekkvonda jarcentoj.

Ukraina stilo montriĝas en pentraĵoj el regno vegetala: herboj, floroj, sovaĝaj kreskaĵoj, plinoj. Ankoraŭ pli antikvaj estas hom- kaj besifiguroj: kornikoj, kokoj, papilioj, hometoj.

Precipa koloro estas ruĝa, sed troviĝas ankaŭ ovoj kun diversaj nuancoj de verda aŭ flava koloro. Tiujn ovojn („pisanki“) oni komencas pentri antaŭ unu monato almenaŭ. La vilaĝa gejunularo rivalas en la beleco de koloroj kaj desegnoj. Precipe pri tio sin okupas virinoj. La arto primitiva, imitado de la naturo, estas vidita en la pentrado de ovoj. Ofte tia paska ovo estas modelo de la popola arto kaj gusto.

Vespere sabate oni portas al preĝejo manĝaĵojn, „pasha“n, ovojn, kukojn, buteron ktp. Oni metas ilin antaŭ la preĝejo. Post la solena meznokta Diservo pastro benas la manĝaĵojn. Eksonas la gaja elvoko: „Hristos Voskres!“ (Kriso

60—61. R. R. Istituto di Studi Commerciali en Genova kaj Venezia.

62. R. Scuola Professionale Regina Margherita en Bologna.

63. Rotary Club en Harrogate.

64. Persa Delegacio ĉe Ligo de Nacioj.

65. Komerca Ministerio de Ĉeĥoslovakio.

66. Germana Regna Ministerio por Internaj Aferoj.

67—77. Esp. institucioj: Int. Komitato por Komuna Komerca Lingvo; UEA; Itala Esp. Federacio; Brita Esp. Asocio; Mediteranea Esp. Federacio; Aŭstruja Esp. Delegataro; Esp. Instituto por la Germana Respubliko; Rumanlanda Esp. Centro; Svisa Esp. Societo; Itala Katedro de Esperanto; Interfoira Komisiono Internacia.

## 2-a Danziga Esperanto-Kongreso. (Postkongreso de Nürnberg).

Danzig estas kaj restos ĉiam urbo vidinda. Mallarĝaj stratoj iras flanke de grandaj modernaj stratoj, kelkcentjaraj konstruaĵoj troviĝas en ĉiuj partoj de la urbo. Danzig estas la loko, kie oni povas kaj devas senti sin bone. Esperanto kreskas kaj floras en la malgranda „Libera Urbo Danzig“.

I-a komuniko.

Tempo: La 2-a Danziga Esp. Kongreso (postkongreso) okazos de 10—14. aŭg. 1923.

Pasportaferoj: Por malpliigi la kostojn estas elektita la agrabla ŝipveturado de Stettin-Swinemünde al Danzig. (Alveno: 10. aŭg. je 13-a).

Aliĝo: Aliĝiloj ne estas dissendataj. Rekomendinde estas skribi adreson, specialajn dezirojn pri loĝejo, gvidado, ktp. sur poŝtkarto.

Kotizoj:  $\frac{1}{8}$  de la Nürnbergaj kotizoj; por malbonvalutaj landoj 500 gmk. Por samfamilianoj 25% malpliigo. La partoprenontoj estas petataj pagi la kotizojn kiel eble plej baldaŭ.

Adresoj: Por leteroj: Esperanto-Werbeamt, Danzig, Kohlenmarkt 3, por menseksoj: Sparkasse der Stadt Danzig (Girokasse) Konto 2896, (Esperanto-Kongres Danzig); Postscheckkonto 729 Danzig, aŭ 6253 Stettin. Al demandoj, al kiuj ne estas aldonitaj resp. kup. ktp., oni ne respondas.

Donaca kazo: Akceptataj donacoj por propagando en la libera urbo Danzig, kvitancoj en ET, la oficiala gazeto de la kongreso.

El la programo.

10. aŭg. Akcepto de la kongresanoj. Vespere malfermo en „Artushof“ (koncerto de famaj danzigaj artistoj).

11. aŭg. Ekskurso al Oliva kaj Zoppot (of. kunsido, koncerto, balo).

12. aŭg. Diservo, katolika kaj protestanta (Esp. predikoj): s-o ekl. kons. Becker, Breslau, kaj s-o pastro Leu, Danzig). Promenado al Langfuhr.

13. aŭg. Gvidado tra la urbo. Publika parolado.

14. aŭg. Daŭrigo de la gvidado. Esperanta ekzameno. Posttagmeze kunveno en la klubejo. Fermo.

Esperanto-Werbeamt

Feltermann, prezidanto.

Majorkiewicz, sekretario.

## Kurioza koincido de nomoj.

De kelkaj jaroj mi ofte ricevas leterojn de samideanoj, kiuj min demandas, ĉu mi ne ludas ian ŝercon: jen ili legas artikolon de *Atanas D. Atanasov*, Esperantisto kiu studas nun en Germanio kaj skribas tie, jen ili legas artikolon de *Atanas D. Atanasov*, studinta antaŭ dek jaroj en la Sofia Universitato kaj neniam vizitinta Germanion. Ĉiuj bulgaraj Esperantistoj sciis, ke *At. D. Atanasov* ne iris al la Helsinka Kongreso, kaj jen en multaj prikongresaj raportoj en diversaj gazetoj ili legis, ke *At. D. Atanasov* partoprenis ĝin.

La afero estas simpla: ni estas du bulgaraj Esperantistoj kun tute samaj nomoj; ambaŭ ni

reviĝis!) Sonoriloj sonoras, aŭdiĝas kanonpafoj. Ĉiuj rapidas hejmen post la benado, la famiilestro disdonas ovojn, kaj oni sin stidigas ĉe la manĝotablon. Post manĝado oni revenas preĝejon, gejunularo promenas, ŝanĝante inter si ovojn, kantaŭte tradiciajn kantojn je honoro de printempo, kantojn de tre antikva deveno.

Kantoj kaj ludoj paskaj en Ukrainio enhavas multe da postsignoj idolanaj. Precipe estas rimarkinda en tiu rilato la kantoj al kaj pri „Lado“ (dliino de beleco). Multaj kantoj estas historiaj, prikantante la epokon aŭ de la kievaj princoj, aŭ de la kamparanaj ribeloj, de la kozaka respubliko ktp.

La paskajn printempajn ludojn partoprenas fraŭlinoj en plej belaj naciaj kostumoj. Ili kantas po du horoj. Junuloj ludas aparte, montrante stan forton, lertecon, aŭ amuzante ĉeestantojn per komikaj scenoj. Ofte ili promenigas kaproviron, deklamante gajajn versojn pri Pasko.

Paskan ludon junuloj surverŝas fraŭlinoj per akvo aŭ portas ilin al riveroj kaj lagoj por enigi ilin en akvon. Tiu ĉi stranga kutimo devenas eble de l' ideo, ke la akvo posedas miraklan, fraŭlinoj donacas al fraŭloj koloritajn ovojn.

La posttagmezo de lundo estas la Pasko de mortintoj. Oni alportas al tomboj panetojn paskajn, kun kandeletoj vaksaj, paskajn ovojn, manĝaĵojn. La pastro iras de unu tombo al alia, legante evangelion.

La merkredo de la kvara postpaska semajno estas solena festo de „Mortaj“ („Rahmani“). La kutimo estas idolana, adaptita al kristanaj ritoj. La festo ne estas oficiala, sed tolerita de la kristana eklezio. Tiun ĉi tagon neniu laboras en la kampoj, ĉar kamparanoj timas malaperi en la tero. Oni asertas, ke almetante orejon al la

skribas Esperantajn artikolojn kaj subskribas ilin — kompreneble — per sama nomo. Jam dufoje ni devis klarigi tion per notoj en „Bulgara Esperantisto.“

Sed la kurioza estas, ke ambaŭ ni havas fratinojn, kiuj estas nomataj ankaŭ same: *Radka D. Atanasova*. Ambaŭ estas Esperantistinoj kaj ne en la lastaj vicoj de la aktivaj agantoj. Unu el ili estis sekretarino de la X-a Bulgara Esperanto-Kongreso, la cetera estas unu el la aranĝintinoj de la ekspozicio ĉe la sama kongreso.

Tiu ĉi neordinara koincido rememorigas al mi unu similan, eĉ pli strangan okazon de nomkoincido. Ĝi estis en 1912. Kiel kunlaboranto de „Danubo“ (tiama komuna organo de la bulgaraj kaj rumana Esperantistoj, aperanta en Bukureŝto), mi estis publicinta en ĝi kelkajn artikolojn kritikantaj idon. Unu tagon mi ricevis de la redakcia sekretario de „Danubo“ *N. Hristoskov* (bedaŭrinde mortigita dum la milito) rumanan revuon kaj leteron, per kiu li demandas min, ĉu mi faras ian ŝercon. Mi malfermis la senditan revuon, kaj kion mi vidis? Artikoloj en rumana lingvo por Ido, subskribitaj unu per la pseŭdonimo *Ada* — ja pseŭdonimo, per kiu mi ofte subskribadis miajn artikolojn en „Danubo“, — alia per la plena nomo de l' aŭtoro: *At. D. Atanasju*.

Prezentu al vi mian miron. Mi mem suspektis unuamomente ian ŝanĝojn. Nu, klare estis, ke ekzistas du internacilingvanoj, unu *At. D. Atanasov-Ada*, bulgare-Esperantisto, kaj alia *At. D. Atanasju-Ada*, rumano-Idisto.

Mi ne scias, ĉu baldaŭ ni ne estos surprizitaj per kvara *At. D. Atanasov*. eble jam Esperantisto aŭ akcidentalano? — Tamen la Esperantistoj *At. D. Atanasovoj* restos plimulto.

At. D. Atanasov  
(unni el la du bulgaraj Ada-oj).

## Serioza Laboro.

De O. Rieck, Greifswald.

En numero 117 de ET mi faris proponon pri starigo de *Universala Esperanto-Biblioteko*. Bedaŭrinde mi ricevis nur malmultajn konsentojn, eble ĉar mi ne donis mian detalan adreson. Des pli ĝoiga estas la entuziasma enhavo de la malmultaj leteroj ricevitaj. Unu el miaj eminentuloj skribis: „Mi trovas en via bonega artikolo „Universala Esperanto-Biblioteko“ la solvon de la grava demando pri Esp. verkoj. Mi sentas min liberigita de nia misero rilate la akcetadon de libroj, rilate la verkadon kaj presadon de tekstoj. Tuj mi kunmetis miajn tradukaĵojn kaj en la gazetoj rrikolojn jam kolektitajn de mi deponi longa tempo en mian dekan kajeron „Englucioj de Esperantistoj“. Miaj kajeroj formas kvazaŭ historion de Esperanto. La unuaj ok kajeroj estas en formo de kolektaj kajeroj, la du pli grandaj en aktoformato. Mi jam iniciencis ĉesigi la engluadon, sed nun post legado de via artikolo mi daŭrigos la laboron.“

Alia samideano konsilis, ke mi faru el mia libroto „Oni ridas“ seriozan sciancan verkon. La ideo estas konsiderinda, ĉar ĝis nun ne ekzistas vere scienca prilaboro de la internacia spritata trezoro, kiel asertita al mi direktoro de universitata biblioteko. La laboro estas tro ampleksa por unu sola homo. Krom tio la usvaj baroj malebligis mian entreprenon. Sed per kunlaborado de ĉiulandaj Esperantistoj ni povas venki la ĝianajn malfacilaĵojn. Mia plano estas jena:

En ĉiu lando oni traduku „Oni ridas“ nacilingve kaj presigu la tradukaĵojn, se eble, per naciaj eldonejoj de amuzaj ĵurnaloj. La mongaino (ĉirkaŭe 10 procentoj de la vendoprezio) el la unua eldono estu dividota inter la tradukonto kaj la nacia Esp. asocio. Mi mem resignus pri ĉiu honorario el la unua eldono. Pro propagandaj celoj la kovriloj de la libroto enhavu la aŭskribon „Tradukita el la nacilingvo Esperanto.“ En mallonga antaŭparolo la tradukonto verbu la legontojn por Esperanto kaj la nacia Esp. asocio. Je la fino senpaga reklama pago estu rezervota por la eldonejo Buijn & Jung, kiu aŭstabe permesas la tradukon. Mia antaŭparolo estu iom alligota. La legontoj estas petataj, subteni la sciancan prilaboradon de la tutmonda spritataĵo, sendante al la nacia Esp. asocio aŭ al mi sciigojn pri tio, kiuj spritataĵoj en „Oni ridas“ jam estas konataj de ili, en kiu alligita formo eventuale ili estas rakontataj, kiam ili ekestiĝis, ĉu ili estas popola propaĵo aŭ devenas de verkinto, kaj kiu ne estas spritataĵoj ŝajnas indaj esti disvastigitaj per Esperanto tra la tuta mondo. La nacilingvaj tradukaĵoj estu senprotaĵaj, kaj la malmultaj spritataĵoj kun vortulduoj estu forlasataj aŭ anstataŭitaj per aliaj steletisigitaj humorajtoj. Franca kaj germana traduko jam estas preskaŭ finitaj. Rilate al la ceteraj lingvoj la

tero, oni povas aŭdi ĝemojn de la mortintoj. Laŭ alia legendo „Rahmani“ ne estas mortintoj, sed piuloj, forkurintaj dezertejon.

En Ukrainio la plej granda festo estas Pasko, la komenco de l' printempo, reviviĝo de la naturo. En tiu festo estas interesinde studi tre antikvajn kutimojn el la idolaneca epoko, pie konservitaj de popolo kaj interniksitaĵ kun ritoj kristanaj.

Komence multaj el ili estis malpermesataj, poste tolerataj kaj fine sankciaj per tradicio popola, kiu restis al ili fidela eĉ post kristaniĝo.

El ukraina lingvo tradukita  
Alexandra Mexin, Genève.

## 1. Aprilo.

(Anstataŭ flugfolio.)

Mi aŭdas plendadon: „Ne bone sukcesas la sankta afero, ĝi lame progresas!“ Nu estu, — sed kie la kaŭzo kuŝas? Pripensu, ĉu tio vin mem ne tuŝas! — P. r. dubojn forigi: jen mia spugulo: En ĝi vin rigardu mem via okulo:

Internacia ideo: brilŝajna afero, Sed multajn forpuŝas la sankta espero: La Esperantistoj la mem ne konscias, jen kion en ver' ili vende elkrias, Patemon, fraŭlinoj de l' tuta homaro? Detruan forliron de l' hejma altaro? Amiko farigu de nun malamikoj? Dangere, miksigi je alpolitiko! La ŝtatoj riproĉos: La nova sento: Ĝu internacia eĉ parlamentoj! Dangero, dangero por nia popolo! Per propra la lingvo! jen ĝia ĉefrolo! — Por tio ni lasu internan ideon: Por nia afer' ĝi signifas pereon. Jen estas la vesto. Denove rigardu En mian spugulon; sed vi vin gardu Grimaci miene, detruu sintenton; Alie, emikoj, vi havos malbenon.



# Helpon, tujan helpon!

La trian fojon la senvidaj Esperantistoj nin preparas por aranĝi sian kongreson, kiu okazos en Nürnberg samtempe kun la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. La „Prepara Komitato por Arango de III-a Internacia Blindul-Esperantista Kongreso en Nürnberg“ formigis el la estraro de la Esperanto-Blindulligo de Germanujo „Ebligo“ sub la prezidanteco de nia eminenta vidanta samideano, s-o Wilhelm Reinert, Direktoro de la Blindulinstituto en Nürnberg, kiu ofereme gvidas la eksteran organizadon, dum la blindaj komitatanoj prizorgas la internan organizadon de la kongreso. Bonvolu permesi al mi per kelkaj vortoj skizi la gravecon de la blindul-Esperantistaj kongresoj:

Estas dirite, ke la blinduloj estas popolo komparebla kun la judoj. Kiel la judoj, ankaŭ la blinduloj troviĝas ĉie en la mondo inter ĉiuj nacioj kaj gentoj. Dum la antaŭe menciitaj posedas sian komunan lingvon, mankis al la popolo de la blinduloj tiu forta ligilo ĝis antaŭ du jardekoj. Multe izolita de aliaj homoj, la plej granda parto da blinduloj vivis sian propran, ofte tre malluman vivon, nenion sciante pri siaj alilandaj samstaranoj. Post la publikigo de Esperanto iom post iom ŝanĝiĝis ĵus nomita bedaŭrinda fakto, ĉar per tiu lingvo la blinduloj en la tuta mondo povas sciiĝi unu la alian pri siaj metiaj, muzikaj kaj eĉ pri siaj sciencaj penadoj. „Esperanta Ligilo“, tiu sola kaj bonega blindulgazeto en Esperanto donis okazon por pridiskuti rimedojn plibonigontajn la sorton de la tutmonda blindularo; tamen, tiu gazeto ne disponis nun pri sufiĉe da loko por detale diskutigi tiom da gravaj aferoj koncernantaj la blindulismon. Nur kongreso, laŭ nia opinio, povas plenumi tian taskon, kaj estas do facile kompreneble, ke vekigi la deziro ĉe la blinduloj, aranĝi specialajn fakkongresojn, kiuj donas okazon raportii pri la stato de la blinduloj en la diversaj landoj, pridiskuti gravajn demandojn kaj solvi ilin laŭeble. Jam antaŭ la milito nombro da nevidantaj ĉeestis Esp. kongresojn, sed tiuj blindulkunvenoj ne povis fari fruktodonan laboron, ĉar estis tro malmultaj partoprenintoj.

En Praha la blinduloj havis sian unuan kunvenon, kiu prave povas esti nomata „kongreso“. Tiu Unua Internacia Blindul-Esperantista Kongreso en Praha vere pruvis la utilecon de la fakkongreso por blinduloj. Tie oni solvis demandojn, pri kiuj oni diskutis multajn jarojn senrezultate. Mi mencias nur la starigon de Internacia Esp. Biblioteko Porblindula. Plue estis faritaj tre interesaj referatoj pri la stato de la blindulmovado en diversaj landoj kaj ankaŭ dum la II-a Kongreso en Helsinko oni solvis same gravajn demandojn kiel tiu pri starigo de Internacia Informejo kaj Statistikero por Blinduloj. El la dirita rezultas klare, ke nia blindulkongreso ne nur estas amuzaj kaj interkonatigaj festoj, sed tempo de serioza laborado por plibonigi la sorton de la tutmonda blindularo.

Certe ankaŭ la III-a Internacia Kongreso de Nevidantaj Esperantistoj en Nürnberg havos la taskon solvi gravajn demandojn kiel tiujn pri starigo de Internacia Blindul-Esperantista Asocio kaj fondado de Internacia Asocio de Nevidantaj Muzikistoj k. a. Gravaj Taskoj! La ĉefkondicio por sukceso de nia „III-a“ estas laŭ mia opinio ke multaj blinduloj el kiel eble plej multaj landoj partoprenu nian kongresan laboron. Laŭscle la ĝenerale konataj blindulprofesioj ne estas tiom profitodanaj kiel aliaj kaj krom tio la nevidantoj ne apartenas ĝenerale al tiuj homoj riĉe benitaj je havaĵoj tiamaniere, ke granda parto el ili ne havas la necesajn monrimedojn mem pagi vojaĝon, loĝadon kaj manĝaĵojn. La ĉefa registaro grandparte financigis la Unuan Blindul-Esperantistan Kongreson kaj la prepara komitato por la „II-a“ obtenis la necesajn monrimedojn per privataj monkolektoj inter vidantaj Esperantistoj tiel ke la senvidaj samideanoj dum la kongreso povis manĝi kaj loĝi tute senpage.

La „Prepara Komitato por Arango de III-a Internacia Blindul-Esperantista Kongreso en Nürnberg“ ne vidas alian vojon por solvo de la financa demando ol peti la vidantajn Esperantistojn je monhelpo por nia „III-a“, por ke la blindaj samideanoj malriĉaj, same kiel en Praha kaj Helsinko, ankaŭ en Nürnberg povu loĝi kaj manĝi senpage.

Ni petas por la blinduloj de ĉiuj landoj, kaj pro tio ankaŭ la vidantaj samideanoj de ĉiuj landoj helpu laŭpove, por ne kia kongreso fariĝu vera kaj granda sukceso ankaŭ por Esperanto.

Tie ĉi ni elparolas nian koran dankon al la L. K. K. de la XV-a por la starigo de la blindulkongreskaso, kiu danke akceptas mondonacojn por nia „III-a“. Malegoiste la redakcio de ET konsentis malfermi monkolekton por la blindulkongreso inter tiuj samideanoj, kiuj ne vizitas la Nürnbergan Kongreson kaj sekve ankaŭ ne kontaktas kun la Blindulkaso de la L. K. K., por ke ankaŭ ili havu okazon monhelpi nian kongreson. Porkongresajn Donacojn akceptas la Redakcio de ET. Estus dezirinde, ke aliaj Esp. gazetoj imitu ĝian ekzemplon.

Hélpu, karaĵ Samideanoj, helpu tuj al ni. La Blindularo Esperantista dankos kaj benos Vin! Vivu Esperanto, la Lumo por la Senlumuloj!

Joseph Kreitz.

Peaschstr. 29, Kreuzau bei Düren, Rheinland, Germ. Sekretario de la „Prepara Komitato por Arango de III-a Internacia Blindul-Esperantista Kongreso en Nürnberg“.

## Dr. Vogt'sche Bank, Stuttgart, Germ.

Wallrathbau Komandit-Societo Friedrichstr. 13  
Telefona: N-oj 11458 kaj 11459. — Telegr.-Adreso: Bankvogt.

Aĉeto kaj vendo de valorpapiroj.  
Procentado de kontantaj deponoj.  
Aĉeto kaj vendo de fremdaj valutoj.  
Perado de ĉiuspecaj negocoj.

## Jus aperis:

Privat: Vivo de Zamenhof.

Speclala eldono por mez- kaj malbonvalutaj landoj.

Salom-Aleĥem, Perc: Hebraj Ra-kontoj

Po-tulu nian lastan prezaron kun firmaj prezoj laŭ naciaj mon-unuoj.

Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Fako,  
Leipzig, Salomonstrasse 15, Germanujo.

## LUKSA-PANO FABRIKOJ

ANTAUÈ HENRI J. CARELS.

60 BUIKOJ: DEN HAAG. HAARLEM. AMSTER- DAM.	LUNĈEJO CARELS (ĈEFO: H. A. SCHAR- WÄCHTER.)	DEN HAAG. 65 WEIMAR- STRAAT. ONI PARO- LAS ESPER- ANTON.
--	--	---



## Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume 2 aŭstakvaj enpresoj) kosias po 2 enpresoj kaj po 30 vortoj (krom unu n-a adreso): [1]  
 6 ET-numeroj por la landoj Aŭstra, Bulgara, Baŭona, Germana, Hungara, Jugoslava, Latvia, Litova, Pola, Rumana kaj Rusia; [2]  
 5 ET-numeroj por la landoj Belgia, Ĉeĥoslovaka, Finna, Franca, Itala kaj Portugalaj; [3]  
 4 ET-numeroj por ĉiuj aliaj landoj. [4]  
 La pagon ni prenas de la abonkoto. Germanaj postabonantoj pagu 5000 mk. Neabonantoj antaŭpago egalvaloran. 2 viajaj frankoj aŭ 6 stamp. respond-kuponojn. Anoncetoj devas elveni 12 tagojn antaŭ publikigo. [5]  
 NASKIĜO. Al ge-oj Leil en Otting, p.: Waging (Bav. Germ.) naskiĝis filino nomita Ingeborg, Eva Roalna. (Del. UEA). [6]  
 JUNA VITRO- KAJ SPEGLULO-POLURISTO kaj facelatio, sperta kaj lerta ankaŭ en manlaboroj kaj tranĉado de stieloj kaj perloj, kaj en ornama polurado de tabula vitro, serĉas posteno en Francio! Propozicij adresu al Esperantista Klubo en Hradec Králové, Ĉeĥoslovakio. [7]  
 UNJA NORDORIENTBOHEMA KARTONAJFABRIKO Josef Kosář, Dobruška, Ĉeĥoslovakio, eksportas kartonojn kaj foldotaĵojn apotekistajn kaj industriajn, jam kun surskribaĵo presitaj aŭ litografitaj. [8]  
 Konstanta ekspoziciaĵo en Praha Internacia specimena foiro, grafika pavilono, stando 1402. [9]  
 PORKOHAROJ! Mi vendas porkoharojn al ĉiuj landoj. Specimenojn kontraŭ antaŭpago. Interŝanĝas pm. 50 por 50 (krom Germanujo.) M. Stein en Młędzyc-Podlaŝki, (Polujo), Szkolna 16. [10]  
 KIU NOBLA SAMIDEANO povas havigi ian laboron en Holando al malriĉa 25-jara laboristo, kiu jam de 5 monatoj estas senlabora kaj tial en plej mizera stato

Bonvolu skribi al Josef Liŝach en Wien 15, Österreich-gaŝee 14/20. [1]  
 FILATELISTO! Kiu sendas al mi 100-1000 poŝtmarkojn stalandajn nedifektajn, ricevas saman kvanton de Hispanujo laŭ lert 1925. Gabriel Alomar, Prez. de EKP. str. Vallori 14 en Palma de Mallorca (Hisp.) [2]  
 SIBERIAJ KAJ RUSAJ SAMIDEANOJ! Kiu acias ion pri la nuna sorto de Josef Rubaček (nask. 12. XII. 1895 en Eipel ap. Trautenu, Bohem.) Li skribis lastan fojon en novembro 1917 el Sarajon apud Volga rimarkante „mi servas al ĉi lia urbeiro“. Bonvolu skribi al Rob. Kolowrat, oficiisto en Zwittau (Ĉeĥoslov.) [3]  
 ATENTU! Kolektantoj kaj amatoj de belulinaj artifoloj-grafajoj! Mi povas re liveri la kolekton „Inquisition“ kaj diversajn aliajn kolektojn (ne reproduktajn, sed originalajn). Postulu oleton de Alfred Menke en Bremen (Germ.) Poŝtfaĉ 518. Se vi deziras specimenojn, sendu lun laŭvolan sumon, kaj mi sendas samvalore. [4]  
 DANA AGRİKULTURISTO (mia nevo) 24-jara, serĉas — de 1 majo aŭ poste — okupad en eksterlande, prefere en Anglujo. Posedas plene praktikan kaj teorlan scion pri dana terkulturo kaj pri brutaria kulturo. Bonegajn rekomendojn de konataj danaj agrıkulturistoj li posedas. Anglan kaj germanan lingvojn li lomi acias. Leterojn oni bonvolu sendi al f-ino Astrid Rybo, vicinspektoro, Komuneskolen ved Sirindholm en København (Dan.) [5]  
 Korespondo kaj Interŝango.  
 S-o J. Mario Stationeempl. C. Q. Leeuwarden (Nederl.) ŝanĝas fotojn, poŝtm. poŝt. kaj fremdan monon. [6]  
 S-o J. B. C. de Koster, 98 Daltonstr. en 's-Gravenhage (Nederl.) ŝanĝas sportofotografajojn per kartoj ilustr. de Nederlando. [7]



Miregon kaŭzas la verketo ĝis nun nepresita Knaboj aŭ knabinoj? Laŭ la volo de la gepatroj. Ĝi pravas la eblicon de laŭvola seksa destino, bazita je la rezultoj de scienca esploro. Distingitaj, facile kompren- eblaj gravaj klarigoj por ĉiu klerulo, same grava ankaŭ por bestredistoj kaj ekonomoj. Tiel havebla kontraŭ antaŭ- pago de 1 sv. tk. aŭ egalvalor. Malbonvalutoj demandu prezon ĉe la liveranto P. Kutter, Ziltau I. Sa. (Germ.) Rosenstr. 5 B m.

**La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof**  
 Inda memorlibro, presita sur luksa papero, kun multaj ilustraj ĵ laŭ originalaj fotoj. Nepre havinda kom- plemento al la libro de D-ro Privat: La vivo de Zamenhof.

## Taglibro de Vilagpedelo

Interesa roman-imila rakonto de la dana verkisto Blicher. Tradukita de s-ano Bahuis, LK-ano. Re- komendita de ELA.

## Oni ridas

Bela kolekto de veraj perloj de bonhumoro kaj sprito. De s-ano Rieck. Rekomendita de ELA kaj reviziita de Zanoni, literatura redaktoro de ET.

Demandu la aktualan prezon ĉe  
**Butin & Jung, Godesberg (Germanujo)**  
 Esperanto-eldorejo, Bahnhofstr. 30  
 Poŝtĉeka konto Köln 920.36.

## Ornamajproduktanto serĉas

**KOMERCAN RILATON**  
 kun importistoj kaj vendistoj de  
**GABLONZ'AJ ARTIKLOJ.**

Rudolf Lang, -- Schmuckwaren,  
 Gablonz a. N., Augasse 6. (Ĉeĥoslovakio).

Serca dramo de fama hungara humoristo  
**Frederiko Karinty: „Morgaŭ matene“**  
 estas aperanta kaj estas plimultekosta post la apero!

Bele kartonita! Proks. 160 paĝoj. Formato 16 : 12 cm. Provizoral prezoj: Por bonvalutoj 1 sv. tk.; por mezbonvalutoj 0,70 sv. tk., afanklie; por malbonvalutoj 250 hung. kronoj plus 20% sendkosto aŭ egalvaloron. Por revendistoj 0,70 sv. tk. kun 20% da rabato.

Antaŭsendu monon kaj mendu ĉe  
 Hungara Esp.-instituto en Budapeŝt VI, Eötvös ut 3.

# Kion la Esperantistaro subtenu unuavice?

1. Sian semalan Jurnalon „Esperanto Triumfanta“; ĉar eĉ se ekzistus nenia Esp. organizaĵo, la ĵurnalo kuntenus kaj kuratigus la samideanojn kaj sufiĉe pruvas al la mondo la jam ne nenligeblan forton de la ideo de lingvo internacia.
2. Sian tutmondan organizaĵon „Universala Esperanto Asocio“; ĉar ĝi estas la plej praktika internacia Esp. organizaĵo, kaj por la mondo ĝi estas la plej evidenta mezurilo por la stato de nia movado.

## Kongresanoj por la XV-a.

Ĝis nun ne nomitaj.

1313. Hackl Karl, Graz	1325. Calisto Maria, s-ino, Graz	1337. Sicherl Karl, Graz
1314. Hackl Ada, s-ino, Graz	1324. Eder Josef, Graz	1334. Wallner Ignaz, Graz
1315. Lossos Karl, Graz	1325. Tumpach Karl, Graz	1355. Wallner Julie, s-ino, Graz
1316. Hallamayer Rolf, Graz	1326. Tumpach Maria, s-ino, Graz	1356. Teilschik Gustav, Graz
1317. Hallamayer Magda, s-ino, Graz	1327. Tumpach Irene, f-ino, Graz	1357. Teilschik Anny, s-ino, Graz
1318. Rogler Willibald, St. Peter/Graz	1328. Tumpach Mizzi, f-ino, Graz	1357. Teilschik Robert, Graz
1319. Rogler Irma, s-ino, St. Peter/Graz	1329. Mörth Paula, s-ino, Graz	1344. Sieudinger Martha, s-ino, Graz
1320. Perneg Ludwig, Eggenberg/Graz	1330. Günter Heinrich, Waltendorf/Graz	1345. Sieudinger Robert, Graz
1321. Hainschegg Adolf, Graz	1331. Schertn Franz, Graz	1347. Klotzmann Ella, s-ino, Graz
1322. Callisto Rudolf, Graz	1332. Schertn s-ino, Graz	1348. ankoraŭ ne konata.

## Kiu ne jam aliĝis, aliĝu tuj!

5 junaj Esperantistoj deziras interŝanĝi pm. kaj pk. (bf) kun ĉiuj landoj. Skribu al Wrbezt, Poŝtfaĉ 15 en Trautenu (Ĉeĥoslov.) [1]  
 Laborista Esp. grupo deziras korespondi kun laboristaj grupoj el ĉiuj landoj precipe kun Azianoj. Skribu al k-do Leonard Lenzen, Maison du peuple en Verviers (Belg.) [2]  
 Antonie Malá, Nĉm. Rybná u. Ŝamberka Ĉeĥoslovakio, eksportas manlaboritajn (gekŝ-pelte) pintojn ĉiuspecajn; kusenangulojn, motivojn por tolaĵoj, kurtenoj, poŝtukoj, kolumoj, mansaketoj, tablokovriloj ktp. [3]  
 Findandaj reprezentantoj en la tuta mondo serĉataj!  
 S-o Franz Kolář en Steyr (Aŭstrio), Wieserfeldpl. 32, deziras korespondi per pk. kaj let. kun ĉiulandanoj. [4]  
 S-o Koloman Martinovits, ferkomercisto (Martinovits-ĉeg. Batthyányi-ier) en Odorhei-Szekelyudvarhely (Rumanujo, Transilv.), interŝanĝas pm. kun ĉiuj landoj, nur rekomende- te. Ne sendas unue. [5]  
 S-o Julio Szabó en Odorhei-Szekelyudvarhely (Rumanujo, Transilv.), str. Principeasa Elisabeta 18, interŝanĝas pm. il. bf, kaj pk. (100-200 en rekomendita letero) kun ĉiuj landoj. [6]  
 F-ino Irena Konieczna en Inowracław (Polujo) Zbychora 4, volas korespondi per pk. il.; interŝanĝas ankaŭ je pm. kaj papermonon. [7]  
 Ruslandanoj! Juna ĉefa fraŭlo, kiu intencas pli poste for- volaĝi al Rusujo, serĉas korespondadon kun Ruslandanoj. Skribu al Josef Švarc en Gladbeck i. W. (Germ.), Ross- heledstr. 66. [8]  
 S-o R Horrisland, fervojisto, Jernbanest. en Kristiansand (Norv.), deziras korespondi kun fervojistoj kaj interŝanĝas pm. prefere kun eksterŝtupanoj. [9]  
 F-ino Elizabeto Brennwasser (16-jara) deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj. Masarykstr. 65, en Prešov (Ĉeĥoslovakio). [1]  
 Eduard Friedmann en Prešov (Ĉeĥosl.) Dolna okr. 40, (25-jara) deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj, prefere kun fraŭlinoj. [2]  
 Por 5 dolaroj aŭ mono en egala valoro ni sendas ĉiujn kurtantaj poŝtmarkojn de la liberŝtato Dapzig, aŭ ankaŭ ĉiujn deziratajn markojn de Germanujo. — W. Schüring en Berlin-Neukölln, Friedelstr. 13, I. [3]  
 Bazilo Averin, en Astraĥani, (Rusl.) Poŝtkesto 14, inter- ŝanĝas poŝtmarkojn, papermonon ktp. Viajn leterojn paku forlike! Sendu (rekomendite) poŝtmarkalbumojn kaj katalogojn (precipe novajn) kaj skribu kiom da sovietaj pm. al vi sendi. [4]  
 Knaboj lernantaj Esperanton en Publika Lernejo de Bilbao deziras korespondi kun alilandaj knaboj. Adreso: Esc- uleatas de Berastegui en Bilbao (Hisp.) [5]  
 S-o J. B. C. de Koster, 98 Daltonstr. en 's-Gravenhage (Nederl.) deziras interŝanĝi pm. kaj fotografajojn kun ĉiuj landoj. [6]  
 S-o Emil Malinen en Viipuri, Hiekka, Peltosa. 4, (Finnl.) deziras korespondi per pk. il. kun ĉiuj landoj. [7]  
 Lennart Lundell, kontoristo, Åbo 1, en Malmö 7 (Sved.) deziras interŝanĝi il. pk. kaj amatorfotojn kun ĉiuj landoj. [8]  
 Mi deziras korespondi kun Esperantistoj de la tuta mondo kaj ricevi gazetojn en nacia aŭ internacia lingvo. Skribu al D-ro Vito de Benedetto en Lecce (Sud-Italujo). [9]  
 Gekursanoj volas korespondi kun ĉiulandaj samideano. Adr.: J. Vilutis, en Dotnava (Litovujo) Likto Mokka. [1]

## LAVU VIN

per antisepta sapo „Lisol-sapo“; ĝi freŝ- igas la haŭton, evitas malsanon!

## RAZU VIN

per antisepta „Lisol-razpaso“; ĝi malebl- igas ekzemojn, forigas la brulon post la razado.

Specimenoj po gmk. 150.— Inkl. sendk. per

ESPERANTO KOMERCISTA  
 GRUPO DRESDEN N.

## Gvidilo tra Bjalystok, la nask-urbo de nia Majstro.

32 paĝoj, kun 6 ilustraĵoj.  
 Prezo: bonvalutoj 0,50 av. tk., malbonvalutoj 0,50 gmk. × ĉiulandanoj, ET-abonantoj la prezo de unu ET-numero (pagon ni prenos laŭdeziro de la abon- koto).

Eldonejo de „Esperanto Triumfanta“ (T. & H. Jung)  
 Herrem bei Köln.

Ni liveras nur librojn de ni mem eldonitajn.  
 Pro aliaj verkoj sin turni al Butin & Jung en Godesberg.

## Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstra: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Wien: „La Esper- antisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postami 34.  
 Belgia: Frans Schoofs, 45, Kl. Beerstraat, Antwerpen. Poŝtĉeka n-o 98420.  
 Brazilia: Brazila Ligo Esperantista, Praça 15 de novembro, Rio de Janeiro.  
 Bulgara: Georgi Rr. Gaŝevaki, Bul. Marie Luiza 46, Sofia.  
 Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenĉka, Hradec Králové, Otto Lumpe, Trautenu. Baŭona: Est. Esp. Unuiĝo, Poŝtkesto 6, Tallinn.  
 Finna: O/V. Movado A/B, Kasarminkatu 2, Helsinki.  
 Franca: Esp. Centre Librejo, 81 rue de Clichy, Paris 9.  
 Hungara: Paŭlo Balkányi, Hajs-utca 15-II-2, Budapeŝt VI.  
 Itala: Itala Esperantista Federacio, Casella Postale 23, Verona  
 Japano: Morizo Ŝe. 16-V, Kitamaĉi, Aojama, Tokio.  
 Jugoslava: D-ro Dusan Maruzzi, Zagreb, Jezuitska ul., br. 1.  
 Latvia: Talivaldo Indra, Rīga, Pesta kaale 475.  
 Litova: Paŭlo v. Medem, Smeltu g-vė 12, Kaŭnas (Kovno).  
 Pola: Adolfo Oberholman, Krak.-Przedm. 10, Warszawa (P. K. O. n-o 3195). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.  
 Rumana: Esp.-Centro Rumana, Bucuresti, Al.ea Suter, 19.  
 Rusia: Mikaelo Valentinov, sekretario de CentreKomitato de S. E. U. Moskvo, poŝtkesto n-o 630.  
 Sveda: Förlägsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.  
 Svisa: Esp. Librejo „Verda Stelo“, Rosenheimstr. 8, St. Gallen-Ost.  
 U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, Box 32, Weehawken N.